

Kataluna Esperantisto



NUMERO 339 (105)
KVINA EPOKO
JULIO-SEPTEMBRO 2006

Movada foiro

Al IJK por ebriigi

Tri komputilaj eldonaĵoj

Kisa televido

Katalunoj en Kontakto

*Crispació colonialista
a la Polinèsia*

*L'Associació
Nova Sento*

*Bòsnia entre la misèria
i l'esperança*

Garantiita enspezo

Nia Judaso

Un centre per a la democràcia lingüística

S'acaba de publicar la versió català del lloc web del Centre Nitobe per a la Democràcia Lingüística (ca.nitobe.info). Aquesta organització malda per augmentar el nivell i la intensitat dels debats públics i polítics sobre les llengües en una Europa que s'uneix, amb vista a elaborar un marc de política lingüística comú, constructiu i realista, que combini la protecció i l'estima de la diversitat lingüística amb la necessitat d'una comunicació eficaç i rica entre tots els ciutadans de la Unió Europea.

El Centre Nitobe uneix a la tecnologia de webs multilingües una xarxa de voluntaris de diversos països del món per facilitar l'intercanvi d'idees, d'informes i d'iniciatives sobre una àmplia gamma de temes relacionats amb la diversitat lingüística i la comunicació. Amb els seus recursos limitats, el Centre intenta de realitzar un model

***Fa de mal dir si la Unió
Europea es planteja
debatre públicament
la política lingüística***

d'eficaç col·laboració interlingüística. Acull de bon grat contribucions en totes les llengües europees, tant oficials com no oficials, i fa de mitjancer per a traduir-les als parlants d'altres llengües. Les activitats d'aquest centre, com moltes altres accions internacionals, són planejades i coordinades per mitjà de la llengua neutral esperanto.

El Centre Nitobe per a la Democràcia Lingüística ha estat llançat pel fons nord-americà per a la recerca Fundació d'Estudis Esperantistes inspirant-se els Simpòsium Nitobe, que de 1996 ençà el Centre per a la Recerca

Segueix a la pàgina 14



Ni ne nur retumu!

Pro siaj malaltaj kostoj kaj ĝia ebleco kunigi la laboron de disaj kunagantaj aktivuloj, interreto fariĝas pli kaj pli la ĉefa investo de la esperanto-movado

Internacia Junulara Kongreso en Bosnio estis pli ol kutime spertoriĉa okazaĵo: tio estis antaŭvidebla, pro la multsignifeco de Bosnio kaj aparte de Sarajevo, des pli por katalunoj, kaj aparte por katalunaj esperantistoj, kiuj delonge estas spirite –kaj ankaŭ aktive– ligitaj al tiu balkana lando. Tion vi povos bone senti en la paĝoj de la revuo, kiun vi tenas enmane.

Sed la IJK estis ankaŭ la videbla starto de projekto elkovita de KEJ en la lastaj monatoj: la kreado de esperantaĵoj. Estis iom da polemiko pri la devizo de la unuaj T-ĉemizoj, kiujn KEJ kreis speciale por la kongreso, sed ilia furora sukceso montris la ĝustecon de la elekto de la ŝerca frapkanzono.

En somero ni spertis ankaŭ la naskiĝon de kvar grandaj ret-projektoj: la nova eldono de *lernu!* –la plej granda retejo por lerni esperanton je ĉiuj niveloj–, la enkonduko de la kataluna en la TTT-ejon de la Nitobe-Centro por Lingva Demokratio kaj la traduko al la

kataluna de la DVD *Esperanto Elektronike*. Al tiu triopo, gvidita de la internacia temo Interreto@Esperanto, aldoniĝas la oficiala lanĉo de KIS TV, nova projekto de KEA pri mallongaj filmetoj rete videblaj.

Pro siaj malaltaj kostoj kaj ĝia ebleco kunigi la laboron de disaj kunagantaj aktivuloj, interreto fariĝas pli kaj pli la ĉefa investo de la esperanto-movado. Tamen ankaŭ personaj kontaktoj estas nemalhaveblaj, kaj tiucele la venontaj monatoj riĉas je tiaj aktivaĵoj: strataj budoj en Prada kaj Barcelono la 9an, respektive la 11an de septembro, prelego en Sant Celoni la 17an de septembro, renkontiĝo en Vallmanya la 30an de septembro kaj 1an de oktobro, partopreno en foiro en Arbúcies la 21an de oktobro, kaŝtan-festo en Vallgorguina la 31an de oktobro kaj 1an de novembro kaj kataluna kongreso de esperanto en Amposta la 8an, 9an kaj 10an de decembro. Ni ne nur retumu!

Hektor Alos i Font



SJOERD BOSGA

En ĉi tiu numero kunlaboris: Carles Verdugo, Christian Pinard, Darío Rodríguez, Éric Collignon, Ferriol Macip, Francesc Poblet, Gabriel Mora i Arana, Gerard Escuer, Joan Inglada, Jordi Aromí, Josep Enric Peres i Blesa, Josep Franquesa, Lluís Aragay, Manel Casanoves, Mon Cardona, Ramon Perera, Sjoerd Bosga, Sylvie Roques, Vildana Delalić, Xavier Margais.

Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la unua sekcio per n-ro 5785
Membro de FOCIR (Federacio de Katalunaj Organizaĵoj Internacie Agnoskitaj)

Peranto de: UEA (revuoj Esperanto, Kontakto kaj libroj), FEL (revuo Monato kaj libroj), IKEL (revuo Etnismo), La Kancerkliniko, La Ondo de Esperanto, Scienca Revuo, Komencanto, Juna Amiko, Internacia Pedagogia Revuo, La Gazeto, Fonto, Literatura Foiro, Heroldo. Ni peras ankaŭ aliajn revuojn.

Apartat/Poŝtkesto 1008
08200 Sabadell (Vallès Occidental), Catalunya/Katalunio
Tel. 937 109 636; Fakso: 937 163 633

Ret-adreso: kea@esperanto.cat
Ret-paĝo: www.esperanto.cat
Ret-listo: Aliĝoj ĉe listestro@esperanto.cat

Kotizoj por la jaro 2006: Individua Abonanta Membro 38 eŭroj; Individua Subtenanta Membro 76 eŭroj; Individua Dumviva Membro 760 eŭroj; Kolektiva Membro 76 eŭroj; Juna Membro 25 eŭroj.
Banko: Caixa d'Estalvis i Pensions de Barcelona Agència 461 Sabadell, Kontonumero: 2100 0461 90 0200055053
IBAN: ES95 2100 0461 9002 0005 5053
Konto UEA: kaea-b
CIF: G-58338567

Plenumkomitato de KEA: Prezidanto: Josep Franquesa; sekretario: Hektor Alos i Font; kasisto: Llibert Puig; komitatanoj: Gemma Armadans, Mateu Vic, Ramon Perera.

Kontrola Komisiono: Christian Pinard, Luz Vázquez, Òscar Puig.

Kataluna Esperantisto: Hektor Alos i Font; esperantlingva revizianto: Ramon Perera; katalunlingva revizianto: Josep Enric Pérez i Blesa; kompostanto: Ferriol Macip i Bonet.

La artikoloj publikigitaj en Kataluna Esperantisto ne nepre esprimas la starpunkton de KEA, se ili ne estas subskribitaj ĝianome.

Kataluna Esperanto-Junularo:

Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la tria sekcio per n-ro 102-AJUV. Landa sekcio de TEJO. CIF: G-58964461

Ret-adreso: kej@esperanto.cat
Ret-paĝo: www.esperanto.cat/kej
Ret-listo: Aliĝoj ĉe www.moviments.net/cgi-bin/mailman/listinfo/kej

Estraro: Prezidanto: Lluís Batlle; vicprezidanto: Pau Climent; sekretario: Joan Català; kasisto: Roger Prieto.

Impres a/Presita ĉe: Copimatge, Sant Cugat del Vallès (Vallès Occidental), Tel. 935 892 368. Dipòsit Legal: B-27362 - 1982

Kursfina festo en Sabadell

Pli ol 30 homoj partoprenis la tradician kurs-finan vespermanĝon en Centro de Esperanto Sabadell la 22an de junio. En ĝi oni ankaŭ adiaŭis Elisabeth Laika, studenton pri matematiko loĝintan ĉe ni tutan jaron danke al Erasmus-stipendio, kaj Sjoerd Bosga, nederlandan esperanto-aktivulon loĝantan en Svedio, kiu pro profesiaj kialoj pasigis la printempon en nia lando. Ambaŭ aktive partoprenis en niaj pasintaj renkontiĝoj, kaj tial danke ricevis po unu ekzempleron de la libro *La komenca esperanto-movado en Katalunio*. Menciindas la ĉeesto de prof. Sirvent, el Venezuelo, kiu pasigis parton de sia sabata jaro en la Aŭtonoma Universitato, kaj de du preterpasantaj usonaj esperantistoj en rondvojaĝo tra Eŭropo. La etoso estis gaja kaj amikema kaj la plurlanda etoso helpis al pliuizado de esperanto.

Movada foiro

Ĉeestis la pasintan Universalan Kongreso 25 katalunoj julie en Florenco. Nia asocio partoprenis en la "Movada Foiro", nova interesa publika aranĝo iniciatita de la kongresa komitato. Bedaŭrinde ĝi okazis en la tago de la inaŭguro de la kongreso, kiu estis ankaŭ tiu de la sovaĝa striko en la flughaveno de Barcelono kaŭzinta la malfruon de pluraj niaj samlandaj kongresanoj. Tio malebligis la alvenon de parto de la preparita materialo. Samtempe la aranĝo, jam anoncita kiel prova, montriĝis tro mallonga, kvankam ege altira: la kvanto de partoprenintaj asocioj tiel larĝe superis la antaŭvidojn de la organizantoj, ke ĉiun budon dividis du asocioj. KEA, do, sin prezentis apud la Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj, kun kiu ĝi tenas viglan rilaton. Aliflanke, Josep Franquesa, prezidanto de KEA, partoprenis la kunsidojn de la komitato de UEA.



HEKTOR ALOS



GENTILIAO DE LLUÍS ARAGAY

*Lluís Aragay (side, centre)
kune kun Josep Franquesa (stare)
ĉe la KEA-tablo, kune kun Daniele Vitali
(side, maldekstre), prezidanto de IKEL*

Al IJK por ebriiĝi



SODERO BOSCA

pretigis speciale por la kongreso, en kiu estis skribite:

Alkohol', alkohol',
alkohol', alkohol', alkohol'!
Tien ĉi venis por ebriiĝi
pri esperanto fajfas ni

La pli ol 50 ĉemizoj furore disvendiĝis.

Tamen la kongreso ja havis ankaŭ seriozajn flankojn, kiel la kunsidojn de la komitato de TEJO, en kiuj Gerard Escuer, el Andoro, partoprenis nome de KEJ, anstataŭante Joan Català, el Valencilando, kiu ne povis vojaĝi al Bosnio. Pro amuza hazardo reprezentis la hispania junularo kuzo de Joan Català, Álvaro Berbís.

La IJK helpis ankaŭ al plifirmigo de la amikeco kaj solidareco de la katalunaj kaj bosniaj esperantistoj. □

Dudek kvin katalunoj partoprenis la 62an Internacian Junularan Kongreson en Sarajevo, per kio denove niaj samlandanoj fariĝis unu el la plej multnombraj naciaj grupoj, kaj

superis la dudek aliĝojn de la pasinta jaro en Pollando. Katalunoj, kiel kutime, fariĝis tre videblaj pro sia muzikemo kaj kantemo: ilia vigleco kaj ŝercemo jam evidentiĝis per la T-ĉemizoj, kiujn KEJ

La verda viruso

La nura konstato, kiu sukcesas tranĝviligi junajn esperantistojn iam ĝuintajn tian ĉi sperton, estas tiu, ke unu jaron post neevitebla adiaŭo ili denove renkontos sin reciproke. Certeco pri estonta venontjara partopreno estas la nura medikamento utila por tiuj, kiuj hazarde aŭ intence iam trovis sin ĉirkaŭitaj de la vere internacia etoso.

Somero iris duonon de sia vojo, sed la aventuroj de nia kolegaro apenaŭ komenciĝas. Dise en la mondo troviĝas stranga kolektivo, kies membroj instinkte, kvazaŭ formikoj, forlasas siajn nestojn kun la celo renkonti siajn samsortulojn. Se estas mono en la poŝo, por ili tute ne gravas kiom longa estas la vojo aŭ daŭra la vojaĝo; ĉiuj kuraĝe, preskaŭ heroe, eltenas malkomfortojn en vagonoj, ŝipoj, veturilaj foteloj, eĉ sur bicikloj. Tamen la kompenso pro la suferado estas granda.

Kiam ĉiu unuopa junulo finfine venas en la ĝustan lokon de ĉiuj celatan, tiu ĉi ĵetas trarigardon ĉirkaŭen, kun la intenco certiĝi pri la ĉeesto de siaj kolegoj. Ĉu iu mankas?

Ĉu novajn infektis la verda viruso?

Post konstato, ke, se ne la tuto, almenaŭ la plimulto de la konataro jam okupas sian lokon, la hazarda individuo, kies konduton ni zorge observos, sentas sin preta alfronti kiun ajn situacion liverotan de la etoso.

Nun ili viciĝas, pretigas biletojn, pagas kotizon, diskutas pri membreco en TEJO kun slovaka longharulo, ricevas ŝlosilojn de la ĉambroj, duŝas sin kaj, surmetinte ŝildon, eliras al la koridoro.

“Saluton!” diras preterpasantoj, sed ankoraŭ, pro nesufiĉa varmeco de la etoso, ili, kvazaŭ ne certaj pri interkompreniĝo, kuraĝas nur ĝentile saluti. La miro de la komencantoj, vizitantaj Esperantion la unuan fojon, estiĝas ekde la unua inter-saluto. Baldaŭ, post dekminuta balbutado en la perono, la miro transformiĝos en jam nekuraceblan malsanon. La hazarda komencanto tuj konstatas, ke dum kelkaj jaroj de sia vivo li vane perdis la tempon en kursoj de la grandafrata lingvo.

Rimarkinte, ke lingvo ne estas plu baro, nia homo komencas scivoleme alparoli la ceterajn anojn de la svarmo. Denove la miro kreskas. En kunsidoj de UN ja kunvenas homoj el tiom da diversaj nacioj, sed ili estas riĉuloj kaj bezonas tradukistojn. Nia svarmo konsistas el homoj el diversaj nacioj, sed plej facile oni povas rimarki, ke alvenis katalunoj. Ĉi lastajn vi komprenos nur se vi rekte kaj sole alparolas ilin. Ne klopodu konversacii kun unu el ili, se proksime troviĝas aliaj.

Kaj la komencantoj kaj tiuj antikvaj parolantoj, delonge ne uzintaj la komunan lingvon, paŝon post paŝo akiras fluecon neniame spertitan. Dume suno malleviĝas kaj, je la luna voko, ĉiuj direktiĝas al la liveristo de drinkaĵoj. Ĉefe la katalunoj, jam kante avertintaj pri siaj intencoj.

Voĉ-agordado, ekfrapado laŭritma de tabloj kaj la ceteron vi persone ĝuos venont-foje.

Carles Verdugo

IJK 2006 – Sarajevo

Vildana Delalić

Prezidinto de la Loka Kongresa Komitato

La 62a Internacia Junulara Kongreso, la jara kaj plej grava renkontiĝo de junaj esperantistoj, okazis ĉi-jare en Sarajevo, Bosnio-Hercegovino. La temo estis “multkultureco kaj tutmondiĝo”. Al IJK aliĝis 420 kaj partoprenis 301 homoj el 43 landoj.

Kial Sarajevo?

La ideo organizi IJK-n en Sarajevo aperis hazarde. La junulara movado en Bosnio-Hercegovino estis longe neaktiva. Krom kelkaj vojaĝoj al internaciaj renkontiĝoj, ne multaj aferoj okazis.

Entuziastoj Samir Ribić kaj Haris Subašić, trinkante kafon en la sarajeva kafejo Parkuša (longe renkont-kafejo de junaj sarajevaj esperatistoj), ekhavis ideon revivigi la movadon per organizado de unu el plej gravaj esperantistaj renkontiĝoj – IJK!

TEJO tuj akceptis la ideon pro la multkultureca simbolo, kia estas Sarajevo mem, kaj deziro vivi la esperanto-movadon en milite tiom damaĝita Bosnio-Hercegovino.

Tiel ni, grupeto de sep gejunuloj, komencis gravan kaj ofte malfacilan laboron!

Etoso

Ekde la komenco de IJK, dimanĉon 6an de aŭgusto, oni povis senti, ke ni faris sufiĉe bonan laboron, kaj jam de tiam la Loka Kongresa Komitato (LKK) estis sufiĉe kontenta. IJK mem estas viva afero kaj de la komenco ĝi kaptas sian propran ritmon kaj la LKK de tiam povas nur observi kaj kontroli, ke ĉio antaŭe planita glate iras.

Okazis pli ol kvardek prelegoj, ses ekskursoj, kvar danckursoj, dudek filmprojekcioj, kvin koncertoj, tri teatraĵoj kaj



la kongreso estis ĉiutage priraportata de amaskomunikiloj!

Sed ĉiuj, kiuj iam partoprenis IJK-n, bone scias, ke la plej grava elemento de IJK estas ĝia etoso. Oni ne povas ĝin anticipi aŭ plani kaj enkalkuli en la programa buĝeto, ĝi estas simple afero, kiu aperas aŭ ne. Jes, la programo estas ege grava, kondiĉoj, loĝejo, manĝaĵoj... sed tio povas estis perfekte planita, okazi senprobleme, sed se ne aperas sento inter partoprenantoj, sento de tutmonda amikeco kaj amo kaj bona etoso, IJK tiam ne plenumas sian taskon – esti junulara renkontiĝo, kiu festas la belecon de la junularo kaj la kunvivado de plej diversaj homoj!

La 62a IJK havis tion, la nekredoblan etoson, kaj pro tio la LKK tute ne meritadas. Partoprenantojn la LKK kore dankas kaj, sincere, plej multe la junajn katalunajn esperantistojn, sen kiuj la 62a IJK certe ne povis esti sama.

Bosnio-Katalunio

Katalunio kaj Bosnio jam delonge havas specialan rilaton. La helpo, kiu venis el Katalunio dum la plej teruraj jaroj de

sarajeva historio, neniam estos forgesbla. La tutan sarajevan kvartalon apud la kongresejo post la milito rekonstruis la urbo Barcelono. Preskaŭ la tuta LKK konsistis el gejunuloj, al kiuj antaŭ dek jaroj estis donacita tri-semajna restado en Sabadell kaj pro tio estis ege grave por ni havi multajn partoprenantojn el Katalunio.

Jam la fakto, ke alvenis multaj katalunoj al la IJK ĉiam garantias bonan etoson, sed alveno de katalunoj al Sarajevo, ĝemela urbo de Barcelono, faras tiun etoson eĉ majestan!

Ni certas, ke longdaŭra amikeco inter bosnianoj kaj katalunoj disvastiĝos ankaŭ en novaj generacioj kaj ke la estonteco portos multajn komunajn renkontiĝojn kaj projektojn.

Kiam la IJK okazos en Katalunio, ni nur povas esperi, ke ni, bosnianoj, povos fari la samon por vi, ĉar, kiam grupo de junaj entuziastoj decidis organizi esperantan renkontiĝon kun la helpo de pluraj geamikoj, nenio povas malsukcesi.

La LKK de la 62a IJK tion nun scias! □

Tri novaj komputilaj eldonaĵoj en la kataluna



Julie estis publikigita la kataluna eldono de la retejo de la Nitobe-Centro por Lingva Demokratio, ca.nitobe.info, —elstara projekto de la usona fondaĵo Esperanto Studies Foundation, la Centro por Esplorado kaj Dokumentado pri la Monda Lingvoproblemo kaj la vigla junulara organizo Esperanto@Interreto.

La labortraduko al la kataluna estis plenumita de Josep Enric Pérez i Blesa, el Xàtiva. Per tio la kataluna fariĝis la naŭa lingvo de tiu ĉi multlingva retejo pri la lingvaj rajtoj en Eŭropa Unio.

Aŭguste Esperanto@Interreto lanĉis la novan version de sia plej sukcesa ido, *lernu!* Ĉi tiu TTT-ejo fariĝis la ĉefa reta esperanto-lernejo danke al siaj multnivelaj kursoj,

lerniloj, vortaroj kaj faciligoj por praktiki la lingvon. Surbaze de la antaŭa granda laboro de Guillem Portell, Hektor Alos tradukis la nove aperintajn partojn. Per tio la kataluna fariĝis unu el la 29 naciaj lingvoj, per kiuj eblas rete lerni esperanton ĉe www.lernu.net.

Inter ambaŭ projektoj, Esperanto@Interreto lanĉis la DVD *Esperanto Elektronike*. Ĝi enhavas ne nur la multlingvan *lernu!*-kursaron, sed ankaŭ video-kurson kaj filmon pri esperanto, kantojn, ludojn, informilojn, fotojn, revuojn, librojn, artikolojn, komputilajn programojn k.a. entute en 8,7 GB. La katalunajn tekstojn tradukis Hektor Alos kaj ilin lingve reviziis Gerard Sugranyes. Kvankam la DVD estas 24-lingva, ĝiaj kovriloj estis eldonitaj nur en esperanto, angla, franca, germana, kataluna kaj litova. KEA mendis 500 ekzemplerojn, kiujn ĝi planas parte vendi kaj parte distribui al bibliotekoj kaj asocioj.

Gaje en Prada

La grupo Esperanto Conflent festis la finon de la kurso de la jaro 2005-2006 la unuan dimanĉon de julio. Ĉirkaŭ fajro de vinber-branĉoj, la kuirado de la tradicia kataluna kolbaso kunigis la anojn de la asocio.

Yvette kaj Josette, la du novulinoj en nia aro, ricevis ateston pro sia konstanteco, kaj ĉiuj gratulis ilin pro ties progreso en

la lernado de la lingvo. La tuta grupo donacis al sia fondinto, Christian, ekzempleron de la NPIV, humure aldonante, ke tio ne estis takso de la nivelo de la instruanto, sed nur instigo por ĉiam plibonigi la kurson.

La laboro farita dum la jaro estas fruktodona: la novaj lernantinoj rapide atingis bonan regadon de la lingvo, kaj ĉiu

membro partoprenis en la du taskoj faritaj: traduko de la flugfolio de la abatejo Sant Miquel de Cuixà, kaj tiu de la preĝejo Sant Pere de Prada. La etoson amikan kaj humuran de la grupo ĝuis ĉiu dum la jaro.

La gelernantoj de nia grupo povis ankaŭ praktiki la lingvon okaze de la veno de Hèctor kaj Lluís el Barcelono, Sjoerd el Nederlando kaj Onjo el Rusio, kiuj vizitis nian belan regionon. Tiel eĉ la esperantistoj, kiuj ne emas vojaĝi, kiel ni, konas la mondon !

La somero refortigu nin, ĉar la kurso rekomencos tuj je la komenco de septembro, post la partopreno en la urba "festo de la asocioj" (la 9an de septembro). Ankaŭ tiam ni finpreparos la renkontiĝon en Vallmanya kun la helpo de KEA (30an de septembro).

Do, ĉiam antaŭen!

Cristian Pinard



ESPERANTO-CONFLENT

Kisas televido

KEA ekhavis televidan novaĵ-servon kun la nomo Kataluna Inform-Servo Televida, KIS TV.

La projekton entreprenis Ferriol Macip kaj Jomo Milla, kunlaborantoj de la loka televid-kanalo Barcelona TV, por kiu ili produktas etan televid-novaĵan programon en la okcitana lingvo. Ĉar ili povis disponi profesiajn ilojn por produkti la informilon kaj spertiĝi pri ilia uzado, ili decidis utiligi tiun sperton kadre de la esperanto-movado. Tiel ekis la ideo de KIS TV. Poste aliĝis al la projekto Miquel Gómez kaj aktivuloj de Valencia Esperanto-Junularo, ĉefe Pau Climent, kiuj ekzorgis pri la realigado de la retejo, www.esperanto.cat/kistv, en kiu eblas spekti KIS TV.

Temas pri reta televid-servo, ia “novaĵ-kanalo”, en kiu, anstataŭ montradi tedan 24-horan programon milfoje ripetatan, oni proponas bongustan menuon diversspecan kun formo de etaj “informkisoj”. Tiel nomas la lanĉintoj de la projekto la etajn filmaĵojn kun tre diversaj kulturaj enhavo.

La celata publiko estas kaj la esperantista kaj la kataluna: la tuta TTT-ejo, tre bele prezentita, estas dulingva kaj la filmetoj estas en esperanto kun katalunaj subtitoloj aŭ foje nacilingva intervjuato kun esperantaj subtekstoj. La informiloj estas mem ne pli ol du-tri-minutaj, sed tute profesi-nivele faritaj.

La enhavo de la unuaj kvin filmetoj evidencigas la strebojn de la teamo. En “aktivula kunveno en Benicàssim” aŭ en “3a printempa renkontiĝo”, oni prezentas la agadon de la junulara esperanto-movado en la Kataluna Landaro, kun intervjuoj al aktivuloj. Simila estas la intervjuo al Miquel Gómez i Besòs, kataluna esperanto-aktivulo ĉefe aginta en Germanio kaj Portugalio. Per intervjuo al Floreal Martorell evidentiĝas, ke KIS TV plezure malfermiĝas al alilandaj agantoj. Kaj laste, prezento de la kataluna tradicia plado *calçots* (krade rostitaj cepoj) montras la interesiĝon pri ekstermovadaj kulturaj temoj – ne nepre en rilato kun la Kataluna Landaro.

La iniciato estas malfermita al ĉiuj: KIS-uloj emfazas, ke kiu ajn deziranto produkti



Jomo Milla

“kiseton” povas tion fari per siaj propraj rimedoj kaj sendi al ili, aŭ ili eĉ povas akcepti materialojn de kunlaboremuloj kaj –se ili montriĝas kvalitataj kaj taŭgaj– kunmeti ilin por krei novajn inform-kisojn. Aliflanke la teamo ne fiksas al si difinitan regulan ritmon por aperigi filmetojn: oni eldonos ilin laŭ la ebloj.

Teknike, la uzata formato estas videbla per Linukso, Makintoŝo kaj Vindozo kaj ĝia malgrandeco kaj kompakto ebligas rapidan elŝuton. Kiel video-servilon oni uzas la grandan retan filmet-interŝanĝejon YouTube, per kiu oni alproksimigas la informilojn al la ekstera publiko (ankaŭ danke al la aldonado de serĉ-vortoj). Resume, per sia strukturo la tuta projekto povas adaptiĝi kaj kreski laŭ bezono kaj facile adaptiĝos al la evoluo de la teknikajoj.

Intervjuoj

Ferriol Macip kaj Hektor Alos estis intervjuitaj de la programo *Radiofórmula Musical* de la katolika radio Ràdio Estel. La intervjuon al Ferriol Macip oni elsendis mardon la 30an de majo, je la 11a kaj la 17a horo, dum tiun al Hektor Alos – en la sekva lundo pentekosta je la samaj horoj.

Aliflanke la ĵurnalo *L'Indépendant* el Perpinjano aperigis novaĵon kun foto la 9an de julio pri la fino de la esperanto-kurso en Prada de Conflent.



Lluís Companys

KE pli multenombra

Danke al la decidoj de la pasinta asemblo, kiu pligrandigis la buĝeton pri informado, *Kataluna Esperantisto* altigis sian eldonkvanton de 300 al 400 ekzempleroj. Komenciĝis kampanjo por distribui ĝin en urbaj, lingvolernejoj kaj universitataj bibliotekoj de Kataluna Landaro, kaj ankaŭ en kulturaj kaj sindikataj organizoj. Per ĝi, uzante la fakton, ke nia bulteno estas parte nacilingva, nia asocio klopodas vastigi la konatiĝon de la esperantismo en medioj konsiderataj favoraj.

Memorigo al ERC

Okaze de la fondo en Bunyola (Majorko) de loka sidejo de Esquerra Republicana de Catalunya, la loka esperanto-grupo estis invitita. Nia samasocio Xavier Margais, nome de Bunyola Esperantistaro, skribe dankis la inviton, kaj profitis la okazon por memorigi la rilatojn de ERC kun esperanto: “Ni emas pensi, ke vi klopodos politike agadi kiel elstaraj heredantoj de la prezidantmartiro, Lluís Companys, kiu dum la milito tenita de la kataluna nacio kontraŭ la eŭropa faŝismo, kaj aparte la hispana, promesis, ke li inkluzivigos esperanton en la lernoprogramon de la katalunaj lernejoj, por ke la junaj katalunoj fariĝu la pioniroj de nova mondo karakterizata de la paco, la libereco kaj la solidareco”.

Josep Maria Claramunt (1928-2006) forpasis ĉi-junie en la meksika urbo Oaxaca, kie li loĝis de antaŭ 30 jaroj. Claramunt, pastro de la Piaĵ Lernejoj, esperantistiĝis en 1962 kaj jam en 1963 predikis en esperanto en la katedralo de Barcelono. Ĝis sia translokiĝo al Meksiko, pastro Claramunt tre aktivis en la kataluna movado per paroladoj, predikoj, artikoloj, tradukoj kaj organizado de kursoj kaj renkontiĝoj. En 1964 li kunfondis la esperanto-grupon de Vilanova i la Geltrú.

Kun morna bedaŭro ni eksciis pri la subita forpaso, la duan de julio, de **Isabel Luís Bellorbí**, 82-jara, kiun puŝbatis aŭtomobilo, senatente retroiranta, en strato apud ŝia hejmo. Ni elkore kondolencas ŝian familion, kaj aparte la edzon, la poeton Gabriel Mora i Arana.

Historia recenzo

La julia-aŭgusta numero de la revuo *Esperanto* publikigas preskaŭ du-paĝan recenzon de Hektor Alos pri la tri libroj pri la historio de kataluna esperanto-movado eldonitaj en la lastaj kvar jaroj: *El moviment esperantista a Mallorca (1898-1938)* de Xavier Margais, *Esperanto en Katalunio (1887-1987)* de Antonio Marco kaj *Els inicis del moviment esperantista a Catalunya – La komenca esperanto-movado en Katalunio* de Francesc Poblet. Post detala analizo, la recenzinto konkludas: “Entute, jen tri libroj ege malsimilaj: tre detala scienca esploro pri la ĝismilita movado en Majorko, en la kataluna; plene malsukcesa banalaĵo pri la katalunia movado, en esperanto; kaj interesa kaj ege plaĉ-lega dulingva verketo pri la komenco de la esperanto-movado en Katalunio.”

Katalunoj plenigas Kontakton



La tria numero de la jaro de la junulara kultura revuo *Kontakto* estas dediĉita al “Lingvoj... Homoj... Politiko”. La temo, pro kompreneblaj kialoj, tre inspiris plurajn katalunajn esperantistojn... kaj kvar iliaj kontribuoj etendiĝas laŭlonge de kvin el la dek ses paĝoj de la numero.

Pau Climent, en sia artikolo “Nur sur papero: la oficialeco de la valencia lingvo” klari-

gas, unuflanke, la diversajn ĉikanojn kontraŭ la kataluna en Valencilando, sed ankaŭ pri la sociologia bazo permesanta ilian eterniĝon. Ferriol Macip prezentas la sufoke preman situacion de la okcitana lingvo en Francio, sub la titolo “Kial la okcitanoj ‘ne komprenas’ la lingvon de la trobadoroj”. Per plej diversaj anekdotoj, la artikolo montras, kiel la ŝtato enkapiĝas la plenan senvalorecon de la okcitana al ĝiaj parolantoj, kaj kiel tiuj ĉi, ofte traŭmate, travivas la malestimon al sia denaska lingvo. Siavice Hektor Alos teoriumas en sia kontribuajo “Por engaĝita socilingvistiko” pri la rolo de lingvistoj por renversi lingvo-anstataŭadon, kaj skizas, kiel entrepreni tiucelajn procezojn.

Tute alietosa estas la dorsa kovril-paĝo de la revuo, kie Onjo Ĉernišova bele priskribas Barcelonon en sia “Barcelono: la unua amo”. En ĝi, nia nova samlandanino, verve priskribas la buntecon de Barcelono kaj ĝiaj kvartaloj, la “grandan miksaĵon de kulturoj, lingvoj kaj karakteroj”, la akceptemon kaj komunikigemon de la loĝantoj (“tamen sen troeco”) kaj la belecon de la modernismaj konstruaĵoj.

Nova traduko el la nov-greka

La 26an de junio oni prezentis en Barcelono novan tradukon de nia kunmembro Montserrat Franquesa, *Els darrers dies de Kontandinos Kavafis*, de Filippou Filippou, eldonitan de Pagès Editors. Montserrat Franquesa, kaj ŝia regula kuntradukanto Joaquim Gestí, estas la plej vigla kataluniganto de la moderna greka literaturo, de kiu ŝi ĝis nun tradukis Dora Giannakopoulou, Litsa Psarafti, Maria Skiadaresi, Andreas Staikos, Soti Triandafilou, Thanassis Valnitós kaj Lili Zografu. Ŝi krome tradukas ankaŭ librojn el la germana kaj angla.



Joan Pere Sunyer

La TTT-ejo de la semajno

La retpaĝaro www.chez.com/jpsunyer de nia aktivulo el Prada de Conflent Joan Pere Sunyer estis elektita de la reta ĵurnalo *Vilaweb Perpinyano* kiel la TTT-ejo de la semajno. La retejo legeblas katalune, france kaj esperante. Joan Pere Sunyer estas poeto kaj gvidas en *Ràdio Arrels* programon pri poezio.

Interreta rubriko

Viziteblas en la portalo de KEA la paĝaro pri nia kongreso en Amposta: www.esperanto.cat/congres2006, katalune kaj esperante, kun paĝoj pri programo, aliĝilo, priskribo de la kongresejo, listo da katalunaj kongresoj, priskribo de la urbo kaj kiel veturi al ĝi, partoprenontaj artistoj kaj artikolo pri la drameca kongreso de KEA okazinta en la jaro 1928 en Vinaròs.

Ankaŭ en la portalo de KEA viziteblas la nova fako KIS TV. Temas pri paĝaro, per kiu oni povas spekti videojn en esperanto kun katalunaj subtitoj. Ĝis la nuna momento spekteblas kvin: raporto pri la KEJ-renkontiĝo en Canet de Mar, Vinilkosmo, “calçotada”, aktivula kunveno de KEA en Benicàssim kaj spertoj en la esperanta movado de Miquel Gómez “Durkapulo”. KIS TV estas trovebla per la adreso:

www.esperanto.cat/kistv

Tri videoj de KIS TV ankaŭ spekteblas pere de la paĝaro Farbskatol’, kiu entenas interesan kolekton da videoj en esperanto, interalie du rilatajn al la lasta UK en Florenco:

farbskatol.net

En la paĝaro de la Centro Nitobe por Lingva Demokratio, konsultebla katalune kaj esperante, aperas rekomendinda debato pri la temo “Ĉu lingvoj minoritataj aŭ minoritigitataj?”:

eo.nitobe.info

La sveda Universitato de Upsala enretigis tri kajorojn de la fama revuo *Esperantologio*. Temas pri internacia revuo pri ĉiuj fenomenoj, kiuj rilatas al esperanto. Ĝi aperigas artikolojn bazitajn sur originalaj studoj pri lingvosciencaj, historiaj, literatursciencaj, psikologiaj, sociologiaj kaj politikaj aspektoj de esperanto:

www.math.uu.se/esperanto

E-Planedo estas ege rekomendinda paĝo. Ĝi publikigas la plej elstarajn artikolojn aperintajn en pluraj esperantaj blogoj: e-planedo.kerno.org

La esperanta vikipedio jam superis la kvanton de 55 000 artikoloj fine de ĉijara monato julio, tial ĝi situas en la dua nivelo de lingvoj uzataj en la fama reta enciklopedio. Jen ties ĉefa retadreso: eo.wikipedia.org/wiki/ĉefpaĝo

Por tiuj bezonantaj tajpi tekston kun supersignoj en komputiloj, en kiuj ne eblas uzi la klavarilon *Ek*, mi rekomendas la enretan konvertilon de Anton Oberndorfer. Oni tajpas laŭ ikso-sistemo kaj aŭtomate aperas la supersignaj tekstoj, kopieblaj al aliaj programoj: members.aon.at/aldone/konvertilo.html

Darío Rodríguez

El guaraní, llengua oficial a Mercosur

L'Ateneu de Llengua i Cultura Guaraní, l'organització civil paraguaiana més important en suport de la llengua i cultures guaraníes, ha endegat aquest proppassat mes de juliol una campanya per oficialitzar la llengua guaraní com a tercera llengua de Mercosur, l'associació econòmica que aplega, des de 1991, el Brasil, l'Argentina, l'Uruguai i el Paraguai. El guaraní és oficial al Paraguai des de 1992 i és parlat per prop de 90 % dels 6,4 milions de paraguaians (un 27 % és monolingüe en aquesta llengua). Això el converteix en la llengua originària d'Amèrica amb un estatus més alt, ja que en altres estats les llengües autòctones només es consideren oficials, com a màxim, en l'àmbit regional o local.

“Des de 1994, el guaraní s'ensenya –amb grans mancances i entrebancs materials, pedagògics i socials –a tots els alumnes paraguaians”, informa en el seu lloc web l'Organització pel Multilingüisme (entitat catalana que treballa pel ple reconeixement de la pluralitat lingüística de l'estat espanyol); alhora assenyala que “l'administració paraguaiana, sobretot en els usos escrits, només funciona en castellà, cosa que resta valor econòmic a la llengua guaraní” i que “no hi ha cap diari, ni cap canal de televisió en guaraní”.

La petició es fonamenta en el fet que el 1991, l'any de fundació de Mercosur, el guaraní encara no era oficial al Paraguai. La campanya persegueix que el guaraní, juntament amb el castellà i el portuguès, sigui declarat llengua oficial i de treball de Mercosur, incloent-hi el futur parlament d'aquesta organització. Ara mateix el guaraní només té la condició simbòlica de llengua històrica de Mercosur, sense cap tipus de conseqüència pràctica.

Louise Bennett, poetessa i folklorista jamaicana

Louise Bennet-Coverley, popularment coneguda com *Miss Lou*, va morir el passat 27 de juliol a vuitanta-sis anys. Des de 1936, quan va sortir per primer cop a un escenari a recitar un poema (i va guanyar un premi),

va dedicar totes les energies a reivindicar el crioll jamaicà, menyspreat com un dialecte de gent inculta per les classes dirigents i el poder colonial. En tota la seva obra –escrita o parlada– va usar el jamaicà, recuperant tradicions pageses i emfasitzant els seus vestigis africans.

El jamaicà és el fruit d'un procés de criollització començat al segle XVII consistent en l'assimilació i nativització de l'anglès per part d'esclaus procedents de l'Àfrica occidental i central. La pronúncia i el vocabulari del jamaicà difereixen prou de l'anglès estàndard per a poder-lo considerar una llengua diferent –tot i que l'anglès és encara l'única llengua oficial de Jamaica. En canvi, el jamaicà és semblant al crioll de Belize i, malgrat un accent marcadament diferent, resulta mútuament comprensible amb un bon nombre de criolls i *pidgin* de l'Àfrica occidental basats primàriament en l'anglès, com el krio de Sierra Leone o l'anglès *pidgin* de Nigèria. Això es deu al fet que força mots jamaicans tenen com a origen diferents idiomes africans i la sintaxi de la llengua és bàsicament derivada d'aquests. Els plurals jamaicans, per exemple, es fan o bé anteposant un cardinal (*de five bud* ‘els cinc ocells’) o bé postposant l'indicador de plural *dem* (*de bud dem* ‘els ocells’). De forma semblant, el temps verbal s'especifica anteposant un indicador de temps (*mi swim* ‘jo nedo’, *mi a swim* ‘joestic nedant’, *mi en swim* ‘jo he nedat’, *mi a go swim* ‘jo nedaré’, etc.).

Algunes veus han apuntat que l'eclosió d'un gran nombre de criolls en el segle XX contrareta en certa manera les llengües que estan desapareixent –a un ritme estimat d'una o dues cada mes. Tanmateix, els parlants habitualment els consideren variants incorrectes de la llengua dominant –gairebé sempre d'origen europeu. Això fa que el procés de descriollització s'hagi pràcticament completat en àmplies zones de l'Àfrica aborigen, a Hawaii, a la costa xinesa, a Singapur i a la Micronèsia i estigui molt avançat a parts de la Melanèsia, on eren numèricament dominants *pidgin* anglesos fins a mitjan decenni dels vuitanta del segle passat. Fins i tot a Papua Nova Guinea, el crioll anglès tok pisin i el crioll papuà hiri motu, tots dos cooficials amb l'anglès, estan retrocedint davant d'aquest.

En aquest context cal celebrar i homenatjar la feina de Louise Bennett per dignificar la



Louise Bennett

llengua del seu poble i preservar la diversitat cultural.

Crispació colonialista a la Polinèsia

El 7 de juliol es va publicar una *Carta oberta pel plurilingüisme a la Polinèsia*. Es tracta de la resposta de la societat civil de la Polinèsia meridional sota administració francesa a la recent resolució del Consell d'Estat francès que prohibia l'ús de qualsevol llengua que no fos el francès en l'Assemblea de la Polinèsia Francesa. El reglament d'aquesta cambra de representació territorial permetia explícitament des de l'any passat les intervencions “en llengua francesa o en llengua tahitiana o en una de les llengües polinèsies”. El Consell d'Estat basa la decisió en l'article 2 de la Constitució francesa, que afirma que “la llengua de la República és el francès”, i, més exactament, en la interpretació capciosa que se'n fa i que va motivar que l'any 1999 el Consell Constitucional rebutgés la Carta Europea de les Llengües Regionals i Minoritàries.

Els redactors de la carta –membres de l'Acadèmia Tahitiana i intel·lectuals– veuen dues opcions per a permetre l'oficialització del tahitià: l'abrogació de l'article 2 de la Constitució o la independència de la Polinèsia dita francesa. Per altra banda subratllen el rebuig del francès que està provocant en la societat polinèsia una decisió que és percebuda com una mostra de “crispació colonialista”.

El Dalai Lama, amb l'esperanto

Tintín, el reporter més cèlebre del còmic, ha estat guardonat a Brussel·les pel Dalai Lama amb el premi “Llum de la Veritat” per haver introduït a molta gent la cultura i els paisatges inspiradors del Tibet, gràcies al viatge que el seu creador, Hergé, li va fer emprendre per aquella regió.

A *Tintín al Tibet* (1959), Hergé fa viatjar al seu protagonista, juntament amb el capità Haddock i el seu gos Milú, a la recerca del seu vell amic Xang, que va patir un accident d'avió a l'Himàlaia. La història és una cer-



Mururoa. L'Estat francès també ha utilitzat la Polinèsia per als seus assajos nuclears.

ca plena d'aventures i trobaments estranys, com són els monjos en un claustre tibetà i el Ieti.

“Gràcies a Tintín, molta gent que llavors no tenia ni idea que existia el Tibet va poder conèixer-lo”, va recordar el Dalai Lama. L'exiliat líder espiritual i polític del Tibet, que va recordar que la situació en aquest territori annexionat per Xina segueix sent molt difícil, va assegurar que “l'ajuda de Tintín fou molt útil”. La fundadora i presidenta de la Fundació Hergé, Fanny Rodwell, va agrair al Dalai Lama el reconeixement “simbòlic” i recordà que Hergé mai va pensar que la seva història tindria tanta transcendència.

Tensing Gyatso, XIVè Dalai Lama i premi Nobel de la Pau 1989, va donar les gràcies a la Fundació Hergé per haver mantingut el 2001 una posició molt clara en contra de l'editorial xinesa “China Children's Publishing House”, forçant-la a canviar la portada de la versió xinesa del còmic, inicialment titulada “Tintín al Tibet xinès”.

Els assistents a l'acte van ser obsequiats amb un exemplar de *Tinçjo en Tibeto*, l'edició en esperanto del llibre. Tintín està traduït a més de 50 llengües, entre les quals en esperanto. En la llengua internacional es poden llegir dos àlbums més del detectiu: *La Krabo kun Oraj Pinçiloj* (El cranc de les pinces d'or) i *La Nigra Insulo* (L'illa Negra).

(www.tintincat.com)



L'associació esperantista Nova Sento i algunes notes sobre l'ofici d'historiar

Francesc Poblet i Feijoo
Historiador

El treball d'historiador sovint deu ser bastant diferent del que molta gent pot pensar. La imatge de l'erudit, potser amb barba blanca i ulleres rodones, absent del que passa al seu voltant, camuflat darrere un parapet de vells lligalls documentals, ensuant polsim de paper groguenc durant llargues hores, i tants altres tòpics, no s'ajusten quasi mai a la realitat quotidiana, tret, això sí, de les prolongades estones de recerca que cal invertir.

No és exactament el cas que us explicaré, que tampoc pretén ser paradigmàtic. Una trucada urgent, com sempre, d'Edicions 62 posa en alerta la maquinària. S'ha decidit –impersonal– la publicació d'un cinquè volum de l'obra *La Guerra Civil a Catalunya*, amb data d'aparició imminent ja fixada i inamovible. Es compta amb la meua col·laboració, puix que en el meu cas concorren dos agreujants: vaig ser membre de l'equip de redacció dels altres volums i se suposa que alguna cosa conec sobre l'esperantisme.

